kursoj, unu supera, gvidota de Alberto Menéndez, kaj alia baza, gvidota de Santiago Mulas.

En aŭgusto de la jaro 1968 okazis en Madrido la **53a Universala Kongreso de Esperanto**. Post la Universala Kongreso de la jaro 1909, (la saman jaron de la fondiĝo de **Astura Esperanta Asocio**) en Barcelono, kun la ĉeesto de D-ro Zamenhof, ne estis alia Kongreso Universala de Esperanto en Hispanio ĝis tiam. En ĉi tiu partoprenis du membroj de la **Esperantista Grupo Jovellanos:** Alberto Menéndez, kaj Santiago Mulas. Krome iris ankaŭ Alfredo Villa Villa kaj iu samideano el Mieres, Cándido Cienfuegos, ĉef-zorganto de esperantista grupo kiu estis kreita en Mieres. Sur ĉi tiu paĝo ni prezentas foto-raporton kun bildoj de la kvar asturaj kongresistoj kun aŭ sen la akompano de aliaj gesamideanoj.



José Palacio Tuero

En kunsido de la estraro de La **Grupo Esperantista Jovellanos**, de dato 30a de aŭgusto, Alberto kaj Santiago informis pri la Kongreso kaj ties sukceso. Partoprenis en tiu forumo pli ol 1700 personoj; nur el Jugoslavio venis 6 aŭtobusoj kun 300 gesamideanoj. La informo respegulis la entuziasmon kaj optimismon kiun oni kutime spertas kaj travivas en tiaj internaciaj renkontiĝoj de la geesperantistoj.


La informantoj aldonis ankaŭ tion ke oni antaŭvidas ke en iu el la sekvaj tri jaroj okazos **Hispana Kongreso de Esperanto** en Mieres. La Esperanta grupo laste fondita en tiu astura urbo subgvide de Cándido Cienfuegos kuraĝas entrepreni la taskon organizi tiun Kongreson.

La lasta akto aŭ aktlibra raporto de tiu periodo estis tiu de kunsido de la estraro de la Esperanto-grupo de Gijón, okazinta la 17an de februaro 1969, en kiu Santiago Mulas informis ke estis komenciĝinta la 6a Esperanta kurso sub lia gvidado, kun partopreno de 18 gelernantoj. Oni bedaŭris tion ke estis malsukcesa la

**Asturaj samideanoj en la 53a Universala Kongreso de Esperanto, en Madrido, aŭgusto de 1968**



**Santiago Mulas Gallego**



**Alfredo Villa kun D-ro Herrero**



**Cándido Cienfuegos kun kataluna geparo**



**Alberto Menéndez antaŭ la kongresejo**



**Cándido Cienfuegos kaj Santiago Mulas**



**Cienfuegos kaj Alfredo Villa kun pola samideanino**